ESPERANTA NATURMETODO

Surbaze de Friis-Kurso de Esperanto

Baza Kurso 1-10

ESPERANTA NATURMETODO

Surbaze de Friis-Kurso de Esperanto

Elaborado sobre cópia offset de parte do curso Esperanto Laŭ Naturmetodo, reimpressão de 1971 da editora Dansk Esperanto-Forlag, autoria de Lorenz Friis (1904 - 1985), membro honorário da UEA, adaptado e rediagramado por Cícero Soares.
Ilustrações: banco de dados público e aplicativo Magic Media, gerador de imagens por IA do Canva.

Salvador (BA), 01/04/2025

cicerogabriel@gmail.com
71 98826-8645

LECIONO 1 (unu)

Eŭropo estas kontinento. Afriko estas kontinento. Eŭropo kaj Afriko estas du (2) kontinentoj. Ankaŭ Ameriko estas kontinento. Eŭropo, Afriko kaj Ameriko estas tri (3) kontinentoj. Ankaŭ Azio kaj Oceanio estas kontinentoj. Ekzistas kvin (5) kontinentoj: Eŭropo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Oceanio.

1 kontinento
2 kontinentoj

ekzistas = estas

Nederlando estas lando. Ankaŭ Belgio estas lando. Nederlando, Belgio, Germanio kaj Danlando estas kvar (4) landoj en Eŭropo. Ankaŭ Italio, Francio, Pollando kaj Portugalio estas kvar landoj en Eŭropo.

en

Berlino estas urbo. Ankaŭ Parizo estas urbo. Berlino, Parizo, Kopenhago, Oslo, Stokholmo kaj Londono estas urboj en Eŭropo. Londono estas urbo en Anglio, Oslo estas urbo en Norvegio, kaj Stokholmo estas urbo en Svedio. Moskvo estas en Rusio.

Rusio estas granda lando, Danlando estas malgranda lando. Grandaj landoj estas ankaŭ Francio, Germanio kaj Anglio. Malgrandaj landoj estas ankaŭ Belgio, Nederlando kaj Irlando. En Islando estas la urbo Rejkjaviko. La urbo estas malgranda, kaj ankaŭ la lando estas malgranda.

La granda urbo en Germanio estas Berlino. La granda urbo en Anglio estas Londono. Londono estas la ĉefurbo de Anglio. Parizo estas la ĉefurbo de Francio. Ankaŭ Oslo estas ĉefurbo. Oslo estas la ĉefurbo de Norvegio.

granda lando
grandaj landoj

malgranda x granda

urbo
la urbo
lando
la lando

ĉef-urbo
la ĉefurbo de...

— Kio estas Afriko?
— Afriko estas kontinento.
— Kio estas Oceanio?
— Oceanio estas kontinento.
— Kio estas Ameriko kaj Eŭropo?
— Ameriko kaj Eŭropo estas kontinentoj.

kio?

ĝi

— Kio estas Belgio?
— Ĝi estas lando.
—Kio estas Francio?
— Ĝi estas lando.
— Kio estas Anglio?
— Ĝi estas lando.
— Kio estas Berlino?
— Ĝi estas urbo.
— Kio estas Madrido?
— Ĝi estas urbo.

— Kio estas Kopenhago kaj Oslo?
— Ili estas urboj.
— Kio estas Afriko kaj Azio?
— Ili estas kontinentoj.
— Kio estas Anglio kaj Belgio?
— Ili estas landoj.

ili

— **Kie estas Oslo?**
— *Oslo estas en Norvegio.*
— **Kie estas Romo?**
— *Ĝi estas en Italio.*
— **Kie estas Helsinko?**
— *Ĝi estas en Finnlando.*
— **Kie estas Stokholmo kaj Malmo?**
— *Ili estas en Svedio.*
— **Kie estas Milano kaj Verono?**
— *Ili estas en Italio.*
— **Kie estas la urbo San Francisko?**
— *Ĝi estas en Ameriko, en Norda Ameriko.*
— **Kie estas la urboj Tokio kaj Hirośimo?**
— *Ili estas en Japanio.*
— **Kie estas la lando Japanio?**
— *Ĝi estas en Azio.*
— **Kie estas la landoj Argentino kaj Brazilo?**
— *Ili estas en Ameriko, en Suda Ameriko.*

***

Italio estas en Suda Eŭropo, kaj Norvegio estas en Norda Eŭropo. Hungario estas en orienta Eŭropo, kaj Hispanio estas en okcidenta Eŭropo. La urboj Madrido kaj Lisbono estas en okcidenta Eŭropo. La urbo Budapesto estas en orienta Eŭropo. Budapesto estas la ĉefurbo de Hungario.

Inter Ameriko kaj Eŭropo estas maro, granda maro. Granda maro estas oceano. La nomo de la oceano estas Atlantiko. Inter Afriko kaj Eŭropo estas alia maro. La nomo de la maro estas Mediteraneo. La nomo de la maro inter Finnlando, Svedio kaj Germanio estas Baltika Maro.

En Baltika Maro estas granda insulo. La nomo de la insulo estas Gotlando. La nomo de alia insulo en Baltika Maro estas Bornholm. Ĝi estas dana, Gotlando estas sveda. Korsiko estas franca, Sardinio estas itala. Korsiko kaj Sardinio estas insuloj ĉe Italio en Mediteraneo. La granda insulo ĉe Anglio estas Irlando. Madagaskaro estas la granda insulo ĉe Afriko.



kie?

la nomo de la...

alia

insulo en lago

Ĉe Norvegio estas multaj insuloj, grandaj kaj malgrandaj. Ankaŭ inter Svedio kaj Finnlando estas multaj insuloj.

En Finnlando estas multaj lagoj. Ankaŭ en Svedio estas multaj lagoj. La grandaj svedaj lagoj estas Vanern kaj Malaren. Multaj aliaj lagoj estas malgrandaj.

Ankaŭ en Svisio estas multaj lagoj. La naturo de Svisio estas bela. Bela estas ankaŭ la naturo de Italio, la naturo de Francio kaj la naturo de multaj aliaj landoj en Eŭropo kaj en aliaj kontinentoj. Ankaŭ multaj urboj estas belaj, ekzemple: Stokholmo, Amsterdamo, Nico kaj Venecio.

ĉe = proksime

multaj: 3, 4, ...99

Svisio ≠ Svedio

***

—Kio estas inter Eŭropo kaj Afriko?
—Inter la kontinentoj Eŭropo kaj Afriko estas maro.
—Kiu estas la nomo de la maro?
—La nomo de la maro estas Mediteraneo.
—Kiu estas la nomo de la granda insulo en Baltika Maro?
—La nomo de la granda insulo en Baltika Maro estas Gotlando.
—Kiu estas la nomo de la alia insulo en Baltika Maro?
—La nomo de la alia insulo en Baltika Maro estas Bornholm.
—Kie estas Sardinio?
—Ĝi estas en Mediteraneo.
—Kiu estas la nomo de la granda insulo ĉe Sardinio?
—La nomo de la granda insulo ĉe Sardinio estas Korsiko.
—Kie en Eŭropo estas multaj lagoj?
—En Finnlando, en Svedio, en Svisio kaj en Norda Italio estas multaj lagoj.
—Kiu estas la nomo de la ĉefurbo de Svisio?
—La nomo de la ĉefurbo de Svisio estas Berno.
—Kie en Eŭropo estas la naturo bela?
—La naturo estas bela en Svisio, Italio, Aŭstrio, Germanio, Hungario kaj... kaj... kaj en multaj, multaj aliaj landoj de Eŭropo. Ankaŭ en aliaj kontinentoj la naturo estas bela.
—Kiu estas la nomo de la ĉefurbo de Danlando?
—La nomo de la ĉefurbo de Danlando estas Kopenhago. Ĝi estas granda urbo. Kaj ĝi estas bela urbo. En ĝi loĝas la familio Hansen.

kio?
kiu?
kie?

loĝas

LECIONO 2 (du)

Sinjoro Hansen estas viro. Sinjorino Hansen estas virino. Karlo estas knabo. Vera estas knabino. Ankaŭ Lisa estas knabino. Vera estas granda knabino, sed Lisa estas malgranda knabino. Karlo ne estas malgranda knabo, sed granda knabo. En la familio estas ankaŭ hundo kaj kato. La nomo de la hundo estas Pluto, kaj la nomo de la kato estas Mimi. Mimi estas la kato de Vera, sed Pluto estas la hundo de Karlo.

sed

— Kio estas Karlo? — *Karlo estas knabo.*
— Kio estas Vera? — *Vera estas knabino.*

— Kio estas Lisa? — *Ŝi estas knabino.*
— Kio estas sinjoro Hansen? — *Li estas viro.*
— Kio estas sinjorino Hansen? — *Ŝi estas virino.*
— Kio estas Pluto? — *Ĝi estas hundo.*
— Kio estas Mimi? — *Ĝi estas kato.*

li
ŝi
ĝi

— Kiu estas viro?
— Sinjoro Hansen estas viro.
— Kiu estas virino?
— Sinjorino Hansen estas virino.
— Kiu estas knabo?
— Karlo estas knabo.
— Kiu estas granda knabino?
— Vera estas granda knabino.

— Ĉu Lisa estas granda knabino?
— Ne!
— Ĉu Lisa estas granda knabo?
— Ne!
— Ĉu Lisa estas malgranda knabo?
— Ne, ŝi ne estas malgranda knabo, sed malgranda knabino.

— Ĉu Vera estas granda knabino?
— Jes, ŝi estas granda knabino.
— Ĉu S-ino Hansen estas kato?
— Ne, ŝi ne estas kato, sed virino.

— Ĉu Pluto estas kato?
— Ne, ĝi ne estas kato, sed hundo.
— Ĉu Mimi estas kato?
— Jes, Mimi estas kato.
— Ĉu S-ro Hansen estas virino?
— Ne, li ne estas virino, sed granda viro.
— Kiu estas la nomo de la viro?
— Ĝi estas S-ro Hansen.
— Kiu estas la nomo de la virino?
— Ĝi estas S-ino Hansen.
— Kiu estas la nomo de la hundo?
— Ĝi estas Pluto.
— Kiu estas la nomo de la kato?
— Ĝi estas Mimi.
— Kiu estas la nomo de la malgranda knabino?
— Ĝi estas Lisa.

kiu?

Kio? — knabo
Kiu? — Karlo

ĉu? = ¿

¿Estas Lisa knabo?

Ĉu Lisa estas knabo?

Ne, — ne — sed

Jes!

S-ino = sinjorino
S-ro = sinjoro

viro
virino
knabo
knabino
sinjoro
sinjorino

Lisa estas malgranda kaj bela knabino. Ankaŭ Vera estas bela knabino. Ili estas du belaj knabinoj. Pluto estas bela hundo. Mimi estas bela kato. Pluto kaj Mimi estas du belaj bestoj. Pluto estas blanka, sed Mimi estas nigra. La koloro de Pluto estas blanka. La koloro de Mimi estas nigra. Karlo estas granda kaj forta knabo.

— Kia estas Pluto?
— Ĝi estas blanka.
— Kia estas Mimi?
— Ĝi estas nigra.
— Kia estas Vera?
— Ŝi estas granda kaj bela.
— Kia estas Karlo?
— Li estas granda kaj forta.
— Kia estas Danlando?
— Ĝi estas malgranda.
— Kia estas Kopenhago?
— Ĝi estas granda.
— Kia estas Londono?
— Ĝi estas granda, tre granda.
— Ĉu ankaŭ Berlino estas tre granda urbo?
— Jes, ĝi estas tre, tre granda.

Konversacio inter Vera kaj Lisa

— Kie loĝas la familio Hansen?
— Ĝi loĝas en Kopenhago.
— Ĉu Kopenhago estas elefanto?
— Ne, ĝi ne estas elefanto, sed urbo, la ĉefurbo de Danlando.
— Ĉu Pluto estas besto?
— Jes, ĝi estas besto.
— Ĉu ankaŭ Karlo estas besto?
— Ne, li ne estas besto, sed homo.
— Ĉu li estas granda kaj forta?
— Jes, li estas tre granda kaj tre forta.
— Kia estas la koloro de Pluto?
— Ĝi estas blanka.

Li estas forta

kia?
kia? — Blanka!
kia? — Forta!

— Ĉu ankaŭ Mimi estas blanka?
— Ne, ĝi ne estas blanka, sed nigra.
— Ĉu ankaŭ tomato estas nigra?
— Ne, ĝi ne estas nigra, sed ruĝa.
— Ĉu ankaŭ citrono estas ruĝa?
— Ne, ĝi ne estas ruĝa, sed flava.
— Kia estas la koloro de la kafo?
— Ĝi estas bruna, sed la tre forta kafo estas nigra.
— Kia estas la ĉokolado?
— Ĝi estas bruna.


citrono

— Lisa, kio estas ruĝa?
— La tomato estas ruĝa.
— Kio estas flava?
— La citrono estas flava. Ankaŭ la banano estas flava.
— Kio estas nigra?
— La forta kafo estas nigra. Sed la ordinara kafo estas bruna. Ankaŭ Mimi estas nigra.
— Kio estas bruna?
— La ĉokolado estas bruna. Ankaŭ la cigaro estas bruna. Sed la forta cigaro estas nigra.

— Kia estas la cigaredo?
— Ĝi estas blanka kaj bruna. Blanka estas la papero ĉirkaŭ la bruna tabako.

— Kio estas ĉirkaŭ cigaro?
— Ĉirkaŭ ĝi estas tabako, kaj ankaŭ en ĝi estas tabako.
— Kio estas blanka?
— Pluto estas blanka, kaj ankaŭ la papero de la cigaredo estas blanka.
— Kia estas la maro ĉirkaŭ la insulo Capri?
— ???
— Ĝi estas blua. Kaj kia estas la koloro de la verda salato?
— Ha, ha, ĝi estas verda. Ankaŭ la Esperanto-stelo estas verda. Blua estas la koloro de la maro.

la verda stelo

— Kia estas la koloro de la elefanto?
— Ĝi estas griza. Ankaŭ multaj katoj estas grizaj.
— Kio estas Pluto kaj Mimi?
— Ili estas bestoj.
— Kio estas tomato kaj banano?
— Ili estas fruktoj.
— Kio estas citrono?
— Ĝi estas frukto.
— Ĉu ankaŭ Karlo estas frukto?
— Ne, li estas homo.
— Ĉu "Heroldo" estas homo?
— Ne, ĝi estas gazeto. Ĝi ne estas ordinara gazeto, sed Esperanto-gazeto.

Gazeto Heroldo de Esperanto

LECIONO 3 (tri)



Tio estas banano!

Tio estas frukto. La nomo de la frukto estas banano. La koloro de la banano estas flava. Ankaŭ alia frukto estas flava: la citrono.

— Kio estas tio?
— *Tio estas tomato.*
— Ĉu tio estas ruĝa tomato?
— *Ne, tio estas verda tomato. Verda tomato ne estas matura. La ruĝa tomato estas matura. La verda tomato ankoraŭ ne estas matura.*
— Kio estas tio?
— *Tio estas verda citrono.*
— Ĉu ĝi estas matura?
— *Ne, ĝi ankoraŭ ne estas matura.*
— Kia estas la koloro de la matura citrono?
— *Ĝi estas flava.*
— Ĉu tio estas frukto?
— *Jes, ĝi estas banano.*
— Ĉu ĝi estas jam matura?
— *Jes, ĝi estas jam matura; ĝi estas flava.*
— Ĉu la ruĝa tomato estas jam matura?
— *Jes, ĝi estas jam matura. Multaj verdaj fruktoj ankoraŭ ne estas maturaj.*
— Ĉu Lisa estas jam granda knabino?
— *Ne, ankoraŭ ne!*



Tomato jam matura

Tomato ankoraŭ ne matura

citrono

— Ĉu Karlo estas ankoraŭ malgranda knabo?
— *Ne, li estas jam granda kaj forta knabo.*

*

Karlo estas la frato de Vera. Karlo estas ankaŭ la frato de Lisa. Ŝi estas la fratino de Karlo. Ŝi estas ankaŭ la fratino de Vera. Ankaŭ Vera estas la fratino de Karlo.

S-ro Hansen estas la patro de Karlo. Li estas ankaŭ la patro de Vera kaj Lisa. S-ino Hansen estas la patrino de Vera kaj Lisa kaj Karlo.

— Kiu estas la frato de Vera?
— *Karlo estas la frato de Vera.*
— Ĉu Lisa estas la frato de Vera?
— *Ne, ŝi ne estas la frato de Vera, sed la fratino de Vera.*
— **Kiuj** estas la fratinoj de Karlo?
— *Vera kaj Lisa estas la fratinoj de Karlo.*
— Kiu estas la patro de Karlo?
— *La patro de Karlo estas S-ro Hansen.*
— Ĉu li estas ankaŭ la patro de Lisa?
— *Jes, li estas ankaŭ la patro de Lisa, kaj ankaŭ de Vera.*
— Kiu estas la patrino de Vera kaj Lisa?
— *S-ino Hansen estas la patrino de Vera kaj Lisa.*
— Ĉu ŝi estas ankaŭ la patrino de Karlo?
— *Jes, ŝi estas ankaŭ la patrino de Karlo.*

Karlo estas la filo de S-ro Hansen. Vera estas filino de S-ro Hansen. Ankaŭ Lisa estas filino de S-ro kaj S-ino Hansen. S-ro Hansen kaj S-ino Hansen estas gesinjoroj (= Ges-roj) Hansen.

La patro kaj la patrino de Karlo estas la gepatroj de Karlo. Filo kaj filino estas gefiloj. Ankaŭ filoj kaj filinoj estas gefiloj. Frato(j) kaj fratino(j) estas gefratoj.

— Kiu estas la filo de S-ro Hansen?
— *Karlo estas la filo de S-ro Hansen.*

Nini estas
la pupo de Lisa

kiu? Vera!
kiuj? Vera kaj Lisa!

gesinjoroj =
sinjoro + sinjorino

gepatroj =
patro + patrino

gefratoj =
frato + fratino

gefiloj

geknaboj

infanoj = gefiloj

— Ĉu li estas ankaŭ la filo de S-ino Hansen?
— *Jes. Li estas la filo de ambaŭ.*
— Ĉu ambaŭ knabinoj estas filinoj de S-ro Hansen?
— *Jes, sed ili estas filinoj ankaŭ de S-ino Hansen. Ili estas filinoj de ambaŭ.*
— Kiuj estas la fratinoj de Karlo?
— *Vera kaj Lisa estas la fratinoj de Karlo. Ambaŭ fratinoj estas belaj knabinoj.*
— Kiuj estas la gepatroj de Karlo?
— *Ges-roj Hansen estas la gepatroj de Karlo.*
— Kiuj estas la gefiloj de Ges-roj Hansen?
— *Karlo, Vera kaj Lisa estas gefiloj de Ges-roj Hansen.*

ambaŭ = la du

kiu = 1
kiuj = multaj

Karlo, Vera kaj Lisa estas geknaboj. Ges-roj Hansen kaj la tri (3) infanoj estas la familio Hansen. En la familio estas tri infanoj: unu knabo kaj 2 (du) knabinoj.

— Kiu estas la nomo de la infanoj?
— *La nomo de la infanoj estas Karlo, Vera kaj Lisa.*
— Kiu estas la nomo de la bestoj?
— *La nomo de la bestoj estas Pluto kaj Mimi. Mimi estas la kato de Vera, kaj Pluto estas la hundo de Karlo.*

— **Kies** kato estas Mimi?
— *Ĝi estas la kato de Vera.*
— Kies hundo estas Pluto?
— *Ĝi estas la hundo de Karlo.*
— Kies infano estas Lisa?
— *Ŝi estas la infano de Ges-roj Hansen.*
— Kies patro estas S-ro Hansen?
— *Li estas la patro de Karlo, Vera kaj Lisa.*

kies = de kiu

*

Pluto estas la hundo de Karlo. Ankaŭ Vera havas beston. Ĝi havas nomon. La nomo de la besto estas Mimi.



Karlo havas hundo**n**

Lisa ne havas hundon. Ŝi ankaŭ ne havas katon. Ŝi havas pupon. Ĝi havas la nomon Nini. Pluto havas blankan koloron, kaj Mimi havas nigran koloron. Indianoj havas ruĝan koloron, kaj negroj havas nigran (brunan) koloron.

— Ĉu Karlo havas ankaŭ katon?
— *Ne, li ne havas katon. Li havas nur hundon.*
— Ĉu Vera havas hundon kaj katon?
— *Ne, ŝi havas nur katon, nigran kaj belan katon, kies nomo estas Mimi.*
— Ĉu ŝi havas multajn fratojn?
— *Ne, ŝi havas nur unu fraton.*
— Ĉu li havas nur unu fratinon?
— *Ne, li havas du fratinojn, kies nomoj estas Lisa kaj Vera.*
— Kiu havas la nomon Eva Hansen?
— *La patrino de Vera, Karlo kaj Lisa havas la nomon Eva Hansen, kaj la patro havas la nomon Adam Hansen.*
— Kio havas ruĝan koloron?
— *Matura tomato havas ruĝan koloron.* **Se** *ĝi ankoraŭ ne estas matura, ĝi havas verdan koloron.*
— Kia estas la koloro de banano, se ĝi estas jam matura?
— *Ĝi estas flava, se ĝi estas jam matura. Se ĝi ankoraŭ ne estas matura, ĝi estas verda.*
— Ĉu Lisa estas jam granda knabino?
— *Ne, ŝi ankoraŭ ne estas granda. Vera kaj Karlo estas jam grandaj.*
— Kio havas blankan koloron?
— *La papero de la gazeto havas blankan koloron; ankaŭ la papero de la cigaredo.*
— Kio havas brunan koloron?
— *Ĉokolado havas brunan koloron; ankaŭ cigaroj, se ili ne estas fortaj.*
— Ĉu indianoj havas nigran koloron?
— *Ne, ili ne havas nigran, sed ruĝan koloron.*
— Kies koloro estas nigra?
— *La koloro de Mimi estas nigra.*
— Kiu havas la nomon Nini?
— *La pupo de Lisa havas la nomon Nini.*

Pluto estas hundo
Karlo havas hundo**n**
Pluto estas blanka
Pluto havas blanka**n** koloro**n**

nur = ne aliaj, sed...

Banano estas flava, se ĝi jam estas matura

Ĉokolado havas bruna**n** koloro**n**

Indianoj havas ruĝa**n** koloro**n**

LECIONO 4 (kvar)



Karlo kaj Lisa ludas "telefonon"

Karlo kaj Lisa sidas kaj ludas. Ili ne ludas **per** la pupo de Lisa, ankaŭ ne "indianojn", sed "telefonon". Karlo ne havas telefonon. Nur Lisa havas, sed ĝi estas la telefono de la pupo.

Karlo: Mi estas Karlo Hansen. Kiu estas vi?
Lisa: Mi estas Lisa. Mi estas malgranda knabino. Kio estas vi?
Karlo: Mi estas granda knabo. Mi loĝas en Kopenhago. Kie loĝas vi?
Lisa: Ankaŭ mi loĝas en Kopenhago.
Karlo: Vi loĝas en Kopenhago; mi loĝas en Kopenhago. Per aliaj vortoj: Ni ambaŭ loĝas en Kopenhago. Ĉu vi ludas per pupo?
Lisa: Ne, mi nun ne ludas per pupo, sed per telefono! Ni ambaŭ ludas "telefonon".
Karlo: Ĉu vi kaj Vera havas multajn pupojn?
Lisa: Ne, mi havas nur unu, kaj Vera havas tri. Per aliaj vortoj: Ni havas nur kvar pupojn.
Karlo: Ĉu vi havas nur kvar pupojn? Ĉu vi ambaŭ nun ludas per ili?
Lisa: Ne, ne Vera kaj mi ludas, sed vi kaj mi. Vera nun ludas pianon. Ŝi havas bonan humoron. Ĉu ankaŭ vi nun havas bonan humoron?
Karlo: Mi **ĉiam** havas bonan humoron. Ĉu ankaŭ vi?

per

mi	ni
vi	vi
li ŝi ĝi	ili

vi + mi = ni
vi + vi = vi

ni ambaŭ = ni du
vi ambaŭ = vi du

ĉiam = konstante

Lisa: Jes, mi havas bonan humoron, **nun** kaj ĉiam.
Karlo: Ni tri gefratoj ĉiam havas tre, tre bonan humoron. Ni **ja** havas bonajn gepatrojn. Ankaŭ ili ĉiam havas bonan humoron.
— Lisa, ĉu vi nun havas bonan apetiton?
Lisa: Jes, nun mi havas grandan kaj bonan apetiton. Mi estas malsata, **tre** malsata.
Karlo: Ankaŭ mi estas tre malsata. Ĉu ankaŭ Nini estas malsata?
Lisa: Jes, ĝi estas malsata, se vi havas bonan ĉokoladon!

nun = en la momento

ja = fakte!

tre = multe

La lito de Lisa

La multaj vortoj de Lisa.

Lisa havas liton. Ĝi estas malgranda, tre malgranda. Ŝi sidas en la malgranda lito kaj ludas per Nini, la pupo. Ŝi ludas, ke Nini estas la infano, kaj ke ŝi estas la patrino.

Ŝi **diras**:
— Mi havas pupon; ĝi estas mia pupo; ĝia nomo estas Nini. Karlo havas hundon; ĝi estas lia hundo; ĝia nomo estas Pluto. Vera ne havas hundon; ŝi havas katon; ĝi estas ŝia kato; ĝia nomo estas Mimi.

Mi havas unu fraton kaj unu fratinon. Ili havas malgrandan fratinon. Ilia malgranda fratino estas mi. Mia patro esta ilia patro, kaj ilia patrino estas mia patrino. Sed iliaj bestoj ne estas miaj bestoj. Mia pupo ne estas ilia. Ĝia nomo ne estas Pluto; ĝia nomo ankaŭ ne estas Mimi. Nini estas ĝia nomo. Nini estas mia infano, sed ĝi ne estas ilia.

Karlo, vi havas malgrandan fratinon. Ŝi ne estas via pupo, sed via fratino. Pluto estas via, sed mia pupo ne estas via. La nigra besto estas la kato de Vera. Ankaŭ ŝi havas pupojn. Sed **ŝiaj** pupoj ne estas **miaj**.

Karlo, vi estas mia frato, kaj vi estas ankaŭ la frato de Vera. Vi estas nia frato. Nia patro havas la nomon Adam, kaj nia patrino havas la nomon Eva. Niaj gepatroj estas gesinjoroj Hansen. Ili estas tre bonaj.

Lisa ludas, ke la pupo estas infano

mi	—	mia
vi	—	via
li	—	lia
ŝi	—	ŝia
ĝi	—	ĝia
ni	—	nia
vi	—	via
ili	—	ilia

La kato diras "miaŭ". La hundo diras "vaŭ". Mia pupo ne diras "miaŭ". Ĝi ankaŭ ne diras "vaŭ". Mi sidas en mia lito kaj diras multajn vortojn. Karlo diras, ke miaj vortoj ne estas interesaj. Vera diras, ke mi havas grandan fantazion. Karlo diras ankaŭ, ke li havas multajn kamaradojn. Li ludas "indianojn" **kun** la kamaradoj, sed mi ne ludas kun liaj kamaradoj. Karlo kaj Vera ne **ofte** ludas kun mi. Ili ludas kun grandaj knaboj kaj grandaj knabinoj. Ne ofte la knabinoj ludas kun Karlo kaj liaj kamaradoj.

Gesinjoroj Hansen

S-ino Hansen estas la edzino de S-ro Hansen, kaj li estas ŝia edzo. Ili estas geedzoj. Ili havas **domon**. Ĝi ne estas granda, sed nur malgranda. Ĝi ne estas en la centro de la urbo, sed en la periferio. La adreso de la familio Hansen estas Zamenhof-strato 3, Kopenhago, Danlando. La domo estas bela kaj moderna.

Ĉirkaŭ la domo ne estas parko, sed ĝardeno, bela ĝardeno. En la ĝardeno **kreskas** multaj rozoj kaj aliaj floroj. Rozoj estas tre belaj floroj. En la ĝardeno kreskas ankaŭ multaj arboj kaj arbustoj.

Multaj arboj portas fruktojn. Ili estas frukt-arboj. Ok (8) portas pomojn, du portas pirojn. En la ĝardeno de Ges-roj Hansen estas 20 (dudek) arboj. Nur 10 (dek) **el** ili portas fruktojn. La aliaj ne estas fruktarboj. Ok el 10 fruktarboj estas pomarboj, kaj du el 10 fruktarboj estas pirarboj.

La fruktoj de la arbustoj estas **beroj**. Bero estas malgranda frukto. Pomo estas granda frukto. **Kelkaj** beroj estas ruĝaj, aliaj estas nigraj.

Arboj kaj arbustoj havas **branĉojn**. La branĉoj de la arboj estas grandaj, sed la branĉoj de la arbustoj estas malgrandaj. La branĉoj portas **foliojn**. Kelkaj branĉoj portas multajn, aliaj portas nur malmultajn foliojn.

ŝia pupo - ŝiaj pupoj

ŝi ludas per pupo
ŝi ludas kun Vera

ofte = konstante

Ĉirkaŭ la domo estas bela ĝardeno



En la ĝardeno kreskas arboj kaj arbustoj



Ruĝa pomo kaj verda piro

Kelkaj beroj estas ruĝaj, aliaj estas nigraj

— Ĉu Karlo kaj Vera estas geedzoj?
— *Ne, ili ne estas geedzoj, sed gefratoj.*
— Ĉu Karlo havas edzinon?
— *Ne, li ne havas edzinon. Ankoraŭ ne. Li estas ja nur knabo.*
— S-ino Hansen, **kiom da** knaboj vi havas?
— *Mi havas nur unu.*
— Kiom da knabinoj vi havas?
— *Mi havas du.*
— Vera, kiom da pupoj vi havas?
— *Mi havas tri pupojn.*
— S-ro Hansen, kiom da personoj estas en via familio?
— *En mia familio estas kvin personoj: mia edzino kaj mi, nia filo Karlo kaj niaj filinoj Vera kaj Lisa.*
— Kiom da bestoj havas la familio?
— *Ĝi havas nur du bestojn, la katon kaj la hundon.*
— Kie loĝas vi, S-ro Hansen?
— *Ni loĝas en Kopenhago, Zamenhof-strato 3.*
— Ĉu en Kopenhago ekzistas nur unu familio Hansen?
— *Ne, en Kopenhago ekzistas multaj familioj Hansen. La nomo estas tre ordinara.*
— Kiom da pirarboj kreskas en la ĝardeno?
— *En nia ĝardeno kreskas nur du pirarboj, sed ok pomarboj.*
— Kiuj ludas "telefonon"?
— *Karlo kaj Lisa ludas "telefonon".*
— Kiu ludas pianon?
— *Vera.*
— Kia estas ŝia humoro?
— *Ĝi estas bona.*
— Kia estas la apetito de Karlo?
— *Ĝi estas ne nur granda, sed tre, tre granda.*
— Kiom da knabinoj kun la nomo Lisa ekzistas en Eŭropo?
— *??? Mi ne scias.*
— Kiom da hundoj ekzistas en via lando?
— *Mi ne scias.*

— KIOM?
— 1, 2, 3...

La koloro DE la katoj
Kiom DA katoj?

ordinara ≠
eksterordinara

Mi ne scias!

— Ĉu vi scias, ke S-ino Eva Hansen estas la edzino de S-ro Adam Hansen?
— *Jes, mi scias.*
— Ĉu vi scias, kie loĝas Karlo, Vera kaj Lisa?
— *Jes, mi scias. Ili loĝas en Zamenhof-strato 3.*
— Ĉu vi scias, kia estas la koloro de la Esperanto-stelo?
— *Jes, ĝi estas verda.*
— Ĉu vi scias la nomon de la ĉefurbo de Islando?
— *Jes, ĝia nomo estas Rejkjaviko.*
— Ĉu vi scias ankaŭ la nomon de la lando inter Francujo, Italujo, Aŭstrujo kaj Germanujo?
— *Jes, ĝi estas Svisujo.*

LECIONO 5 (kvin)



S-ino Hansen havas fraton. La nomo de la frato estas Jansson, Tom Jansson. Li havas edzinon kaj du infanojn. La nomo de la infanoj estas Petro kaj Pia. Petro estas knabo, Pia estas knabino.

La familio Jansson loĝas en Malmo. Malmo estas urbo en Svedujo. La distanco inter Kopenhago kaj Malmo ne estas granda, sed malgranda. Inter ili estas maro. La nomo de la maro estas Oresund.

La familio Jansson ofte vizitas Kopenhagon, kaj ĝi vizitas ankaŭ la familion Hansen. Ili estas parencoj: S-ro Jansson estas la frato de S-ino Hansen. S-ino Hansen estas la bofratino de S-ino Jansson, kaj S-ro Hansen estas la bofrato de S-ro Jansson. La patrino de S-ino Hansen estas la bopatrino de S-ro Hansen. Ŝi estas ankaŭ la bopatrino de S-ino Jansson.

La patro de S-ino Hansen estas la bopatro de S-ro Hansen kaj de S-ino Jansson. La nomo de la bopatro estas ankaŭ Jansson, Ture Jansson. Li estas la avo de Karlo, Vera kaj Lisa. Li estas ankaŭ la avo de Petro kaj Pia.

frato - bofrato
fratino - bofratino
patro - bopatro
patrino - bopatrino
filo - bofilo
filino - bofilino

La bopatrino de S-ro Hansen estas la avino de la kvin infanoj. La geavoj havas nur unu filon kaj unu filinon. La filo estas S-ro Jansson, kaj la filino estas S-ino Hansen.
S-ro Hansen estas ilia bofilo kaj S-ino Jansson estas ilia bofilino.

S-ro Jansson estas la onklo de Karlo, Vera kaj Lisa. S-ino Jansson estas ilia onklino. Petro estas la kuzo de Karlo, Vera kaj Lisa; kaj Pia estas ilia kuzino.

Karlo vizitas la familion Jansson en Malmo. Ĝi havas grandan modernan domon kun bela ĝardeno. Karlo kaj liaj gekuzoj ludas en ĝi. Ankaŭ unu el la kamaradoj de Petro estas en la ĝardeno. Lia nomo estas Helge. Li vizitas Petron kaj Pia-n, sed li ankoraŭ ne konas Karlon. Nun li scias, ke la familio Jansson havas parencojn en Kopenhago. Li diras al Pia:

— Pia, ĉu vi havas multajn parencojn en Kopenhago?
— Jes, mi havas miajn geonklojn kaj gekuzojn.
— Kio estas la nomo de via kuzo?
— Lia nomo estas Karlo, kaj la nomo de miaj kuzinoj estas Vera kaj Lisa.
— Ĉu vi konas viajn kuzinojn?
— Jes, mi konas ilin. Ili estas belaj kaj bonaj knabinoj.
— Ĉu ili konas ankaŭ vin?
— Jes, ili konas min; ili konas nin ambaŭ, Petron kaj min.
— Ĉu vi konas Kopenhagon?
— Jes, mi konas ĝin. Ĝi estas bela kaj interesa urbo. Tre interesa estas Tivoli. Ĉu vi konas ĝin?
— Jes, mi konas ĝin. Ĝi estas parko en la centro de la urbo. Ĝi havas pantomimo-teatron, karuselojn, muzikon kaj speciale bonan humoron.
— Ĉu via onklino en Kopenhago estas la fratino de via patrino?
— Ne, ŝi estas la fratino de mia patro. Nun ŝia nomo estas Eva Hansen.
— Kie loĝas viaj geavoj?
— Ili loĝas en Norda Svedujo. Ni ne ofte vizitas ilin, ĉar la distanco estas granda. Sed ili vizitas nin.

avo + avino = geavoj

onklo + onklino = geonkloj

kuzo + kuzino = gekuzoj

La geavoj

ili + n = ilin

vi + n = vin
mi + n = min
ni + n = nin
ĝi + n = ĝin
li + n = lin

— Kia estas via onklo en Kopenhago?
— Li estas tre, tre bona. Ni amas lin. Ni amas ankaŭ nian onklinon.
— Ĉu vi amas ankaŭ...

Nun ankaŭ Karlo kaj Petro estas ĉe Pia. Petro diras al Karlo:

— Karlo, ĉu vi ankoraŭ havas vian hundon?
— Jes, mi ankoraŭ havas ĝin. Ĉu vi ankoraŭ scias ĝian nomon?
— Jes, ĝia nomo estas Pluto.
— Ĉu vi ankaŭ scias, kia estas ĝia koloro?
— Jes, ĝi estas blanka.
— Ĉu vi konas ankoraŭ mian malgrandan fratinon?
— Jes, mi konas ŝin, sed ŝi ne konas min. Sed ĉu vi konas mian kamaradon Helge?
— Ne, mi ne konas lin.

Petro prezentas Helge al Karlo. Pia diras al Karlo, ke Helge estas ankaŭ ŝia bona kamarado.

Helge, Pia kaj Petro estas Malmoanoj. Karlo estas Kopenhagano. Karlo estas dano, ĉar li loĝas en Danlando. Helge, Pia kaj Petro estas svedoj.

Helge diras, ke kelkaj el liaj parencoj estas norvegoj, kaj ke aliaj estas amerikanoj. Unu el liaj kamaradoj estas germano, sed li nun loĝas en Svedujo. Li ludas pianon. Li havas grandan talenton.
— Ĉu ankaŭ vi ludas pianon, Karlo? — demandas Helge.
— Ne, respondas Karlo — kaj demandas: "Helge, ĉu vi ludas?"
Helge respondas: "Mi ne ludas, ĉar mi ne havas talenton." — Kaj li demandas: "Kial vi ne ludas?"
— Ĉar ankaŭ mi ne havas talenton! Kial vi ne ludas, Pia?
— Mi ludas, respondas Pia, sed nur per radio-aparato, ĉar ĝia muziko ĉiam estas bona, tre, tre bona.
Mia piano-muziko estas tre malbona.

Mi amas lin

Malmö**ano**
Kopenhag**ano**
Amerik**ano**
Brazil**ano**

Helge demandas:

Karlo respondas:

Ŝi demandas lin, kial li ne havas radio-aparaton. Helge respondas: "Miaj gepatroj havas aparaton, sed mi havas gramofonon, malgrandan fraton, bonan liton, bonan humoron kaj — grandan apetiton."

Pia diras: "Ankaŭ mi. Mi estas nun malsata kiel hundo!"

Petro respondas, ke li estas malsata kiel elefanto. Kaj li invitas ilin al la domo, kie estas limonado kaj kukoj.

Ankaŭ en la domo ili diskutas. Unu demandas kaj la aliaj respondas. Karlo diras:

— Helge, vi havas gramofonon, malgrandan fraton, bonan liton kaj bonan humoron. Kial vi ne havas hundon kiel mi?

— Ĉar se mi havas hundon, la humoro de mia malgranda frato kaj la apetito de mia patrino ne estas bonaj.

Karlo demandas Pia-n: "Kial vi ne havas katon kiel Vera?"

Ŝi respondas: "Ĉar mia patrino diras, ke mi mem estas kato."

S-ro Jansson invitas la kvar geknabojn al kinejo, kie ili rigardas interesan filmon kaj aŭskultas bonan muzikon. La nomo de la filmo estas “Mia hundo kaj mi en Gronlando”. Kun granda intereso ili rigardas la belan naturon de Gronlando, kaj ili aŭskultas kun granda intereso la vortojn. La homoj en Gronlando estas eskimoj aŭ Gronlandanoj. Ili havas multajn hundojn.

La aŭtomobilo de s-ro Jansson portas Karlon al la ŝipo Malmo—Kopenhago.

***

En Zamenhof-strato 3, Lisa demandas la grandan fraton:

— Kio estas la nomo de mia kuzino? — Karlo respondas, ke ŝia nomo estas Pia.

— Kial ŝi estas sveda?

— Ĉar ŝi logas en Svedujo.

— Ĉu Petro estas granda aŭ malgranda knabo?

— Li estas granda.

Ni demandas per:

kiu
kio
kie
kia
kies
kiom
kial
ĉu

Ili estas demandaj vortoj!

kukoj



kinejo = film-teatro



ŝipo

— Ĉu Pia havas multajn pupojn?
— Mi ne scias, ĉu ŝi havas multajn aŭ malmultajn pupojn.
— Ĉu eskimoj estas amerikanoj aŭ angloj?
— Ili ne estas angloj, ankaŭ ne amerikanoj. Ili estas danoj, ĉar Gronlando estas parto de Danlando kiel Jutlando kaj Bornholm.
— Kie en la mondo estas Gronlando?
— En la norda parto.
— Ĉu la mondo estas granda aŭ malgranda?
— Lisa, la mondo estas tre, tre granda.
— Ĉu miaj svedaj gekuzoj vizitas la kinejon ofte aŭ malofte?
— Mi ne scias.

parto

kontinento = mondparto
parto de la mondo

LECIONO 6 (ses)

Januaro

lundo	mardo	merkredo	ĵaŭdo	vendredo	sabato	dimanĉo
				1	2	3
4	5	6	7	8	9	10
11	12	13	14	15	16	17
18	19	20	21	22	23	24
25	26	27	28	29	30	31

Januaro
Februaro
Marto
Aprilo
Majo
Junio
Julio
Aŭgusto
Septembro
Oktobro
Novembro
Decembro

Januaro estas monato. Ankaŭ februaro estas monato. Unu jaro havas dek du (12) monatojn: unu (1), du (2), tri (3), kvar (4), kvin (5), ses (6), sep (7), ok (8), naŭ (9), dek (10), dek unu (11), dek du (12).

Januaro estas la unua (1-a) monato de la jaro, februaro estas la dua (2-a) monato de la jaro, marto estas la tria (3-a) monato, aprilo estas la kvara (4-a), majo estas la kvina (5-a), junio la sesa (6-a), julio la sepa (7-a), aŭgusto la oka (8-a), septembro la naŭa (9-a), oktobro la 10-a (deka), novembro la 11-a (dekunua) kaj decembro la 12-a (dekdua).

Januaro estas la unua monato de la jaro, sed decembro estas la lasta monato de la jaro. Unu jaro havas dek du monatojn. Unu monato havas kvar semajnojn. Tri monatoj havas dek tri (13) semajnojn. Unu semajno havas sep tagojn. Du semajnoj havas dek kvar (14) tagojn.

— Kiom da monatoj havas unu jaro?
— Ĝi havas dek du monatojn.
— Kiom da semajnoj havas unu jaro?
— Ĝi havas kvindek du (52) semajnojn.
— Kiom da semajnoj havas unu monato?
— Ĝi havas kvar semajnojn.
— Kiom da tagoj havas unu semajno?
— Ĝi havas sep tagojn.
— Ĉu vi scias la nomojn de la sep tagoj de la semajno, Lisa? — demandas la patro.
— Jes, — respondas Lisa, — mi scias ilin: dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo kaj sabato.
— Kiu monato estas la unua de la jaro?
— Januaro estas la unua monato de la jaro.
— Kiu monato estas la lasta de la jaro?
— Decembro estas la lasta monato de la jaro.
— Kiu tago estas la unua de la semajno?
— Dimanĉo estas la unua tago de la semajno.
— Kiu tago estas la lasta de la semajno?
— Sabato estas la lasta tago de la semajno.
— Kiu el la tagoj de la semajno estas la unua?
— Dimanĉo estas la unua tago de la semajno.
— Kiu el la tagoj de la semajno estas la kvara?
— Merkredo estas la kvara tago de la semajno.
— Kiu el la tagoj de la semajno estas la kvina?
— Ĵaŭdo estas la kvina tago de la semajno. Vendredo estas la sesa, kaj sabato estas la sepa kaj lasta tago de la semajno.
— Kiu el la monatoj estas la naŭa?
— Septembro estas la naŭa.
— Kiu el la monatoj estas la lasta?
— Decembro estas la lasta monato de la jaro.
— Kiu estas la oka tago de la semajno?
— Ne ekzistas oka tago de la semajno, ĉar unu semajno havas nur sep tagojn.
— Kiu monato de la jaro estas la dektria?
— Ne ekzistas dektria monato de la jaro, ĉar unu jaro havas nur dek du monatojn.

Kio ĝi estas?
Ĝi estas urbo!

Kiu urbo ĝi estas?
Ĝi estas Parizo!

Kiu estas li?

Kiu monato?

Lundo
Mardo
Merkredo
Ĵaŭdo
Vendredo
Sabato
Dimanĉo

Unu jaro estas longa tempo. Unu sekundo estas mallonga tempo. Mil (1000) kilometroj estas longa distanco, sed unu metro estas mallonga distanco.

Malgrandaj cigaroj ordinare estas mallongaj. "Mediteraneo" estas longa vorto, sed "maro" estas mallonga vorto. Kelkaj stratoj estas longaj, aliaj estas mallongaj.

Kelkaj homoj havas bonan fantazion, aliaj havas malbonan fantazion. Kelkaj filmoj estas bonaj, aliaj estas malbonaj. La pupoj de Lisa kaj Vera estas belaj, sed ekzistas en la mondo ankaŭ malbelaj pupoj. Malbela estas la muziko, se Vera ludas pianon. Sed bela ĝi estas, se talenta pianisto ludas ĝin.

* * *

Karlo kaj patro sidas kaj diskutas la problemojn de la moderna tempo. La patro diras inter alie, ke ankaŭ mono estas problemo, kaj ke multaj angloj diras, ke tempo estas mono.

— Patro, ĉu vi havas multan tempon?
— Jes, Karlo, mi havas multan tempon.
— Mi gratulas, ĉar vi havas multan monon.
— Ne, Karlo, la vortoj ne estas veraj. Mi havas malmultan monon, sed multan tempon. Ne ĉiam homoj diras verajn vortojn. Se mi diras, ke mi havas multan monon, mi diras malverajn vortojn. Kaj se vi diras, ke la distanco inter Kopenhago kaj Malmo estas longa, vi diras malverajn vortojn. Se vi diras malverajn vortojn, vi mensogas. Bonaj homoj ne mensogas. Nur malbonaj homoj mensogas.

— Patro, ĉu mi mensogas, se mi diras, ke ni havas bonan patrinon?
— Ne, Karlo, vi ne mensogas, sed diras tre, tre verajn vortojn, ĉar ŝi estas la plej bona patrino en la tuta mondo.



longa
mallonga

granda
malgranda
bona
malbona
bela
malbela

mono

bona
pli bona
plej bona

— Kaj vi estas la plej bona patro en la tuta mondo. Kaj nia domo estas la plej bela en la tuta urbo, kaj mi estas la plej forta knabo de la tuta strato.
— Karlo, ĉu vi nun ne mensogas? Via kamarado estas pli forta ol vi. La domo de lia patro estas pli bela ol nia. Kaj lia patro estas pli bona patro ol mi, sed lia patrino ne estas pli bona ol via patrino.
— Patro, ĉu mi mensogas, se mi diras, ke nia aŭtomobilo estas pli bela, pli granda kaj pli moderna ol ilia?
— Vi ne mensogas, Karlo, sed nia aŭtomobilo estas pli nova ol ilia. Nia estas la lasta modelo, la plej nova modelo de la fabriko.

* * *

En decembro estas granda festo, la festo de Kristo. Ĝi estas la naskiĝotago de Kristo. La nomo de la festo estas Kristnasko. Inter ĝi kaj la nova jaro estas unu semajno. Kristnasko estas ankaŭ la festo de la infanoj. Vi ne konas la vorton "naskiĝotago", ĉar ĝi estas nova, sed nun vi komprenas ĝin. S-ino Hansen havas naskiĝotagon en marto, kaj Vera en septembro.

— Kiam estas la naskiĝotago de via frato, Lisa?
— Ĝi estas en januaro.
— Kiam estas via naskiĝotago?
— Ĝi estas en februaro, respondas Lisa.
— Kiam estas mia naskiĝotago?
— Patro, via naskiĝotago estas en aŭgusto.
— Kiam estas Kristnasko?
— Ĝi estas en decembro.
— Ĉu Kristnasko estas bona festo?
— Jes, ĝi estas tre, tre bona festo, la plej bona festo de la jaro.
— Vi ŝatas Kristnaskon.
Lisa ne respondas, ĉar ŝi ne komprenas la vorton "ŝatas".

5 estas pli **ol** 4

granda
pli granda **ol**
plej granda

kiam = en kiu tempo?

naskiĝo + tago =
naskiĝotago

la infano naskiĝis

— Lisa, "ŝatas" estas nova vorto. Vi ankoraŭ ne komprenas ĝin. Mi ŝatas longan cigaron kaj bonan muzikon. Via patrino ŝatas fortan kafon kaj belajn florojn. Karlo ŝatas romanojn pri indianoj, Vera ŝatas romanojn pri junaj knabinoj kaj modernan muzikon. Kaj vi ŝatas pupojn kaj bestojn. Ĉu vi nun komprenas la vorton "ŝatas"?

— Jes, nun mi komprenas ĝin. Mi ŝatas pomojn, pirojn, bananojn kaj aliajn fruktojn. Vera ŝatas filmojn pri aliaj landoj kaj kontinentoj, kaj Karlo ŝatas kriminalfilmojn.

— Lisa, ĉu vi scias, ke nia nigra kato ŝatas kafon kaj limonadon?
— Ne, Mimi ne ŝatas kafon, ankaŭ ne limonadon, sed lakton, la blankan bonan lakton.

— Ĉu ankaŭ Pluto ŝatas lakton?
— Ne, ĝi ne ŝatas la bonan lakton, sed mi ŝatas ĝin.

— Ĉu vi ne gratulas Pluton?
— Kial?
— Ĉar ĝi havas naskiĝotagon!
— Pluto, mi gratulas vin!

libro **pri** matematiko

Vera ŝatas muzikon
Vera muzikon ŝatas
Muzikon Vera ŝatas
Muzikon ŝatas Vera
Ŝatas muzikon Vera
Ŝatas Vera muzikon

LECIONO 7 (sep)

Unu, du, tri estas nombroj. Lisa nombras pomojn: Unu, du tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu, dek du, dek tri, dek kvar, dek kvin (15), dek ses (16), dek sep (17), dek ok (18), dek naŭ (19), dudek (20), dudek unu (21), dudek du (22), dudek tri (23)... dudek naŭ (29), tridek (30), tridek unu (31), tridek du (32)... kvardek (40)... kvindek (50)... sesdek (60)... sepdek (70)... okdek (80)... naŭdek (90)... cent (100).

Dek estas unu kaj nulo. Cent estas unu kaj du nuloj.
Unu kaj tri nuloj estas mil.
Unu kaj kvar nuloj estas dek mil.
Unu kaj kvin nuloj estas cent mil.
Unu kaj ses nuloj estas unu miliono.
Mil milionoj estas unu miliardo.

nulo = 0

— Lisa, nombru ĝis dek! diras Vera. Vera nombras: Unu, du, ti, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ kaj dek.
— Ĉu vi scias, kiu nombro estas antaŭ dek? demandas Vera. Lisa scias kaj diras: Antaŭ dek estas naŭ kaj post dek estas dek unu.
— Kiu nombro estas antaŭ cent?
— Naŭdek naŭ!
— Kiu nombro estas post cent!
— Cent unu!
— Nombru ĝis unu miliardo! diras Vera al Karlo, sed li respondas: Mi ne havas tempon!

ŝi nombras

Karlo skribas kelkajn nombrojn kaj diras al Vera:
— Vera, diru la nombron 47!
— Kvardek sep!
— Diru ankaŭ 569!
— Kvincent sesdek naŭ!
— Kaj ankaŭ 1961!
— Mil naŭcent sesdek unu!

Karlo skribas la nombron 8 kaj diras al Lisa:
— Diru la nombron!
Lisa konas la nombron kaj diras tuj "ok".
— Skribu, Lisa, la nombron unu kaj nulo kaj diru ĝin!
Lisa tuj skribas la nombron kaj diras "dek"!

Kaj tuj post tio ĉi demandas Karlon:
— Kiom da nuloj havas cent?
Li diras tion kaj ŝi skribas la grandan nombron.

— Lisa, se vi scias la nombrojn inter kvardek kaj kvindek, diru ilin!
Ŝi tuj respondas kaj nombras:
— Kvardek unu, kvardek du, kvardek tri... kvardek naŭ.

— Vera, diru la nombron 1 kun 7 nuloj! diras Karlo.
Sed ŝi ne tuj respondas, sed skribas la nombron 10 000 000.
Post tio ŝi diras: Dek milionoj!

— Lisa ne scias, sed vi scias, kiun jaron ni havas nun?
— Ni nun havas la jaron mil naŭcent sesdek du.
— Kiom da tagoj havas unu jaro?
— Unu jaro havas tricent sesdek kvin aŭ tricent sesdek ses tagojn.
— Kiom da tagoj havas februaro?
— Ĝi havas dudek ok aŭ dudek naŭ tagojn.
— Kiom da tagoj havas decembro!
— Ĝi havas tridek unu tagojn.



Li skribas nombrojn



Nombru!
Diru!
Skribu!

banano estas tio
li diras tio**n**

kiu jaro estas?
=
ni havas kiu**n** jaro**n**?

— Lisu, kiom da jaroj havas vi?
— Mi havas kvin jarojn.
— Ĉu Vera havas dek jarojn?
— Ne, ŝi havas dek unu jarojn. Aŭ: ŝi estas dekunu-jara.
— Ĉu mi estas dekdu-jara aŭ dektri-jara?
— Vi estas 13-jara. Vi ankoraŭ ne estas 14-jara.

dek-jara
=
havas dek jaroj**n**

Unu jaro estas longa tempo. Unu sekundo estas mallonga tempo. Unu jaro estas pli longa tempo ol unu monato. Unu monato estas pli longa tempo ol unu semajno. Januaro estas pli longa tempo ol Februaro, ĉar Februaro havas nur dudek ok aŭ dudek naŭ tagojn, sed Januaro havas tridek unu.

Karlo estas pli granda ol Vera. Karlo estas pli aĝa ol Vera, ĉar li havas 13 jarojn, kaj ŝi havas nur dek unu. Vera estas pli aĝa ol Lisa, sed Karlo estas la plej aĝa. Vera estas pli forta ol Lisa, sed Karlo estas la plej forta el ĉiuj gefratoj.

Vera estas malpli forta ol Karlo. Ŝi estas ankaŭ malpli granda. Februaro estas malpli longa monato ol januaro, kaj unu semajno estas malpli longa ol unu monato.

mal/pli
3 estas malpli ol 4

Karlo demandas, kaj Lisa respondas. Se Lisa ne scias, Vera respondas. La du grandaj gefratoj instruas la malgrandan fratinon, kaj ŝi lernas. Ŝi lernas pri la tempo. Vera kaj Karlo instruas ŝin pri la tempo.

— Kiu nombro havas pli multajn nulojn, mil aŭ cent?
— Mil, ĉar ĝi havas tri nulojn, sed cent havas nur du.
— Kiu estas pli aĝa, via patro aŭ via patrino?
— Nia patro estas pli aĝa ol nia patrino. Ĉu ne?
— Jes, Lisa, nia patro estas pli aĝa. Ĉu vi scias, kiu monato estas post Januaro?
— Jes, post Januaro estas Februaro.
— Kiu monato estas antaŭ Aprilo?
— Antaŭ Aprilo estas Marto.

— Diru la monatojn inter Aŭgusto kaj Oktobro!
Sed Lisa ne tuj respondas. Ŝi pensas. Post tio ŝi respondas:
— Inter Aŭgusto kaj Oktobro estas nur unu monato, Septembro.
— Bone, Lisa! diras Karlo. Vi estas inteligenta knabino.
Vi pensas bone kaj inteligente. Ĉu vi pensas ofte pri Kristnasko?
— Ne, ne pri Kristnasko mi pensas ofte, ankoraŭ ne, sed mi pensas ofte pri mia pupo kaj ĝiaj amikoj Mimi kaj Pluto.
— Ĉu vi pensas, ke Kristnasko estas en Septembro?
— Ne, mi scias, ke ĝi estas en Decembro.
— Kiu tago estas antaŭ lundo?
— Dimanĉo estas antaŭ lundo.
— Kiu estas la tago post lundo?
— Post lundo estas mardo.
— Kiu tago estas inter mardo kaj ĵaŭdo?
— Inter mardo kaj ĵaŭdo estas merkredo.
— Ĉu vendredo estas antaŭ aŭ post sabato?
— Ĝi estas antaŭ sabato. Post sabato estas dimanĉo.
— Ĉu vi scias, ke mia naskiĝotago estas en Januaro?
— Jes, mi scias, ke ĝi estas la deka de Januaro.
— Jes. Kiam estas via naskiĝotago?
— Mia naskiĝotago estas la 12-a (dekdua) de Oktobro.
— Kiam estas la naskiĝtago de via patrino?
— Ĝi estas la oka de Aŭgusto.
— Kiam estas Kristnasko?
— Ĝi estas la 25-a de Decembro.
— Kiu dato estas hodiaŭ?
— Hodiaŭ estas (Lisa rigardas la kalendaron) la 9-a de Oktobro.
— Ĉu hodiaŭ estas lundo?
— Ne, hodiaŭ ne estas lundo, sed sabato.
— Ĉu vi scias, kiu havas naskiĝotagon hodiaŭ?
— Ne, mi ne scias. Ĉu Mimi?
— Ne, ne Mimi, sed nia avino en Svedujo.
— Karlo, skribu al ŝi kaj gratulu ŝin.

ŝi pensas

ŝi estas bon**a**
ŝi pensas bon**e**

10-a de Januaro
=
deka [tago] de Januaro

hodiaŭ = la tago nun

Junio, Julio kaj Aŭgusto estas la varmaj monatoj de la jaro, sed la malvarmaj monatoj estas Decembro, Januaro kaj Februaro. La nomo de la varmaj monatoj estas somero.

Decembro, Januaro kaj Februaro estas vintro. Vintro estas la malvarma sezono, somero estas la varma sezono.

La jaro havas kvar sezonojn: vintro, printempo, somero kaj aŭtuno. Printempo estas la plej bela sezono. Majo estas la plej bela monato de la jaro, diras multaj homoj. Aliaj diras, ke ankaŭ Aprilo, Junio kaj... kaj... ĉiuj aliaj monatoj estas belaj.

Ne nur la somero estas bona sezono, sed ankaŭ ĉiuj aliaj. Ne nur ni diras tion, sed ĉiuj aliaj en nia familio.

Ne ĉiuj homoj en la mondo havas la varman sezonon en Junio, Julio kaj Aŭgusto. Kelkaj havas ĝin en Decembro, Januaro kaj Februaro.

***

Tio estas horloĝo. Ĝi havas du montrilojn, unu estas longa, la alia estas mallonga. Ili montras la tempon.

La longa montras la minutojn, kaj la mallonga montras la horojn. Unu horo havas sesdek minutojn, kaj unu minuto havas sesdek sekundojn.

— La longa montrilo montras 12, kaj la mallonga montras 3. Kioma horo estas?

Lisa tuj respondas, ĉar ŝi scias tion:

— Estas la tria horo.

Sed se la longa montrilo ne montras 12, ŝi ne scias, kioma horo estas. Karlo kaj Vera instruas ŝin, kaj Lisa lernas nun pri la horoj kaj la horloĝo.

Unu tago havas dek du (12) horojn. Ankaŭ la nokto havas dek du horojn. Unu tag-nokto havas dudek kvar (24) horojn.

Unu horo havas sesdek (60) minutojn. Tridek (30) minutoj estas duona horo. Dek kvin (15) minutoj estas kvarona horo. Sesdek (60) minutoj estas tuta horo.

horloĝo

Kioma horo estas?
Estas la 3-a horo!

1/2 = duona
1/4 = kvarona

— Lisa, diru, kiom da horoj havas la nokto?
— Ĝi havas 12 horojn.
— Kio estas pli longa, la tago aŭ la nokto?
— Ili estas same longaj.
— Kio estas pli longa, januaro aŭ marto?
— Ili estas same longaj, precize same longaj.
— Kio estas pli longa, duona aŭ kvarona horo?
— Lisa ne tuj respondas, sed rigardas la horloĝon kaj pensas. Post tio ŝi diras:
— Duona horo estas pli longa, ĉar ĝi havas 30 minutojn. Kvarona horo havas nur dek kvin minutojn.



— Kioma horo estas nun? (la longa montrilo montras 6, kaj la mallonga montras inter 5 kaj 6)
— Estas duono post la kvina.
— Kioma horo estas nun?
— Estas kvarono post la kvina, ĉar la longa montrilo montras tri kaj la mallonga kvin.

— Kioma horo estas nun?
— Estas kvarono antaŭ la kvina, ĉar la longa montrilo montras 9 kaj la mallonga montras 5.
— Kioma horo estas nun?
— Estas kvin minutoj antaŭ la kvina (la longa montrilo montras 11 kaj la mallonga 5).

— La longa montrilo montras 4 kaj la mallonga inter 5 kaj 6. Kioma horo estas?
— Estas dudek minutoj post la kvina (horo).

LECIONO 8 (ok)

Estas dimanĉo en la bela monato majo. Karlo sidas en la ĝardeno. Li sidas sur benko. Ankaŭ Lisa sidas sur la benko. Lisa sidas apud Karlo. Apud la benko staras arbo. Ĝi estas granda pomarbo. Antaŭ Lisa kuŝas ŝia pupo.

Antaŭ la benko staras tablo. Malantaŭ la tablo staras seĝo. Sur ĝi sidas Vera kaj skribas. Ŝia papero kuŝas sur la tablo. Ŝi skribas multajn vortojn kaj nombrojn.

Ankaŭ Karlo havas paperon. Ĝi kuŝas sur la sama tablo kiel la papero de Vera. Li ne skribas sur la papero, sed desegnas. Li desegnas homon. Li ne desegnas bone. La homo ne estas bela, sed tre malbela. Ĝi havas du brakojn, du gambojn kaj unu kapon. Ĉiu homo havas du brakojn, du gambojn kaj unu kapon.

Sur la kapo kreskas haroj. Ĉiu homo havas harojn sur la kapo. Kelkaj havas blondajn harojn, aliaj havas nigrajn harojn. Ankaŭ la vizaĝo de la viroj havas harojn. Ili estas la barbo. Virinoj ne havas barbon. Ankaŭ ne knaboj kaj knabinoj.

— Ĉu mia viro ne estas bela? demandas Karlo, sed Lisa tuj respondas, ke ĝi estas tre, tre malbela.
— Ĉu vi scias, kio kreskas sur la kapo de mia viro?
— Jes, Karlo, estas haroj. Sed ili ne estas belaj, ĉar ili estas mallongaj. Vera kaj mi havas belajn harojn, ĉar ili cstas longaj.
— Ĉu vi scias, kio kreskas sur lia vizaĝo?
— Jes, estas barbo. Kial vi ne havas barbon?
— Ĉar mi ne estas viro, ankoraŭ ne. Mi estas nur knabo. Kaj vi estas nur malgranda knabino.



la vizaĝo

La vizaĝo havas du okulojn, unu nazon kaj unu buŝon. La kapo havas ankaŭ du orelojn. Kelkaj homoj havas grandajn orelojn, aliaj havas malgrandajn. Karlo havas grandajn, sed Lisa havas tre, tre malgrandajn. La nazo estas inter la okuloj. Ĉiu homo havas nazon, ĉiu homo havas ankaŭ du okulojn. Kelkaj homoj havas bluajn okulojn, aliaj havas brunajn. Sub la nazo estas la buŝo. La buŝo de la sinjorinoj estas ruĝa. Ĉiu homo havas nazon, kelkaj havas grandan, aliaj havas malgrandan nazon.

ĉiu homo =
unu homo

ĉiuj homoj =
la homoj en la tuta mondo

— Lisa, ĉu ĉiuj homoj en la tuta mondo havas buŝon?
— Jes, ankaŭ vi kaj mi. Via buŝo estas pli granda ol mia. Tion diras mia patrino. Kial la buŝo de Vera ne estas ruĝa kiel la buŝo de nia patrino?
— Ĉar ŝi ankoraŭ ne estas granda virino. Lisa, vi havas bluajn okulojn. Rigardu miajn kaj diru, ĉu ankaŭ ili estas bluaj!
Ŝi rigardas kaj diras:
— Viaj okuloj estas bluaj. Kaj ankaŭ la okuloj de Vera estas bluaj.
— Kio estas sub via nazo?
— Sub ĝi estas mia buŝo.
— Kio kuŝas sub la tablo?
— Pluto kaj Mimi. La kato apud la hundo.
Ĉiu brako havas manon, kaj ĉiu mano havas kvin fingrojn. Ĉiu gambo havas piedon, kaj ĉiu piedo havas kvin piedfingrojn. La piedoj estas sub la gamboj.

— Lisa, kiom da fingroj havas ĉiu mano?
— Ĝi havas kvin fingrojn.
— Kiom da manoj vi havas?
— Mi havas du manojn.
— Kiom da fingroj vi do havas?
— Mi havas... (paŭzo, ĉar Lisa nombras ĉiujn fingrojn) ...dek fingrojn.
— Bone, Lisa, vi nombras korekte. Ĉu vi scias ankaŭ, kiom da gamboj vi havas?
— Jes, mi havas du gambojn.
— Kiom da piedfingroj havas ĉiu piedo?
— Ĉiu piedo havas kvin piedfingrojn, kaj ĉar mi havas du piedojn, mi do havas... (malgranda paŭzo) ...dek piedfingrojn.
— Lisa, ĉu vi scias, kiun da haroj estas sur via kapo?
— Ne, Karlo, ankaŭ vi ne scias tion.
— Jes, mi scias la precizan nombron. Ĝi estas okcent mil sepcent kvindek tri.
— Ne, Karlo, tion mi ne kredas.
— Nombru ilin, se vi ne kredas.
Sed Lisa ne nombras la harojn. Ŝi ankaŭ ne kredas lin.



kesto

La kamarado de Karlo ne estas en la ĝardeno, kie la gefiloj de Ges-roj Hansen sidas, ĉar li estas malantaŭ la domo, kie li loĝas. Li faras aŭtomobilon. Li faras ĝin el malnovaj kestoj.

Li havas bonajn kaj fortajn manojn kaj faras ofte malgrandajn objektojn, ekzemple pupo-liton por la malgranda fratino, ŝipon por la malgranda frato kaj pupo-teatron por la pli granda fratino. Ankaŭ grandajn objektojn li faras, ekzemple la aŭtomobilon, sed ĝi ne estas por la gefratoj, sed por li mem.

La kvar radojn sub la aŭtomobilo li ne mem faras, sed li aĉetas ilin en malnova kaj malgranda butiko. Nun la aŭtomobilo funkcias. Ĝi veturas. Ĝi veturas al la ĝardeno de Karlo, Vera kaj Lisa. La kamarado (Paŭlo estas lia nomo) mem sidas en ĝi. Ĝi veturas per liaj piedoj.

sub la aŭto estas kvar (4) radoj

Paŭlo prezentas ĝin. Ĉiuj tri gefratoj, unu post la alia, veturas en ĝi ĉirkaŭ la domo. Post tio Paŭlo veturas al la domo, kie li mem logas. Post la paŭzo, Karlo, Vera kaj Lisa denove sidas ĉe la tablo. Vera denove skribas nombrojn kaj vortojn, kaj Karlo denove desegnas.

Li diras al Lisa:

— Kio estas tio?

— Tio estas la okuloj.

— Kion ni faras per la okuloj?

— Per la okuloj ni vidas.

— Ĉu vi vidas bone?

— Jes, mi vidas bone. Sed nia avino en Svedujo ne vidas bone. Ŝi kuŝas en hospitalo, ĉar ŝi estas malsana. Ŝi vidas tre malbone per la okuloj. Ŝi havas malsanajn okulojn. Nia avo estas sana kaj forta. Li ne estas en la hospitalo.

— Kie vi kuŝas, kiam vi estas malsana?

— Mi kuŝas en mia lito. Mi kuŝas kaj dormas.

— Kiam vi dormas?

— Mi dormas en la nokto.

— Kiom da horoj vi dormas en la nokto?

— Mi dormas ok ĝis dek horojn.

— Kion havas Vera en la manoj?

— Ŝi havas libron. Ĝi estas romano. Ŝi legas ĝin. Ŝi diras, ke ĝi estas romano pri grandaj knabinoj. Ŝi legas multajn interesajn romanojn.

— Kial vi ne legas romanojn?

— Karlo, vi scias, ke mi estas tre malgranda.

— Kion legas mi?

— Ordinare vi legas romanojn pri indianoj kaj negroj. Sed nun vi ne legas.

— Kion vi faras per la nazo?

— Per la nazo mi flaras. Sed ne nur mi flaras, ankaŭ vi kaj ĉiu homo.

— Jes, Lisa, oni flaras per la nazo. "Oni" estas mi kaj vi kaj ĉiuj homoj.

Kio estas tio?

Kio**n** vi faras per la okuloj?

libro

— Ĉu vi ofte flaras parfumon ĉe nia patrino?
— Ne, sed ĉe nia onklino en Malmo. Ŝi havas tre bonan parfumon.
—Kion oni faras per la oreloj?
— Per la oreloj oni aŭdas.
— Ĉu vi aŭdas bone?
— Jes, mi aŭdas bone, sed vi ne ĉiam aŭdas bone. Ofte nia patrino diras vian nomon, sed vi ne aŭdas.
— Malgranda fratino! Viajn vortojn mi ne komprenas! Diru, kion oni faras per la buŝo!
— Per la buŝo oni parolas. Kelkaj homoj parolas multe, aliaj parolas malmulte. Per la buŝo oni ankaŭ trinkas. Oni trinkas kafon, lakton, teon kaj limonadon. Kelkaj homoj trinkas multe, aliaj trinkas malmulte. Oni ankaŭ manĝas per la buŝo. Oni manĝas ĉokoladon, bananojn, tomatojn kaj pomojn.

parolas = diras vortojn

— Ĉu vi scias, kion oni faras per la kapo?
— Lisa pensas kaj diras: Ne, mi ne scias.
— Mi diras tion al vi: per la kapo oni studas kaj pensas. Vi ankoraŭ ne pensas multe, sed nia patro pensas multe. Li pensas pri la problemoj de la mondo. Li ne parolas multe, sed li pensas multe.
— Ĉu vi scias, kion oni faras per la gamboj?
— Jes, oni staras kaj iras. Vidu! Vera iras nun al nia patrino. Ŝi ne iras al la domo de la kamaradino.
— Kien ŝi iras?
— Ŝi iras al nia patrino.
— Ĉu vi scias, kien mi iras nun?
— Vi iras al ĉokolado-butiko, ĉu ne?
— Ne, Lisa, ĉar vi ne ŝatas ĉokoladon, mi ne iras al butiko, sed mi iras al mia kamarado kun la aŭtomobilo.

kie ŝi estas?
kien ŝi iras?

kien? al nia patrino

LECIONO 9 (naŭ)

Du semajnoj pasas. La homoj iras, ankaŭ la bestoj, sed la tempo ne iras; ĝi pasas.

Du semajnoj pasas. Denove estas dimanĉo. Denove la geknaboj estas en la ĝardeno malantaŭ la domo. Ili ne iras, ankaŭ ne staras, sed sidas.

Karlo sidas hodiaŭ sur la seĝo, kaj ambaŭ knabinoj sidas sur la benko. Karlo legas. Hodiaŭ li legas romanon pri eskimoj en plej norda Gronlando. Ĝi estas tre interesa. Li diras nur tre malmultajn vortojn al ambaŭ fratinoj.

Vera kaj Lisa parolas. Ili parolas pri la kato. Ĝi sidas sur la benko, inter ili. Sur la tablo kuŝas kelkaj objektoj: libro, malgranda kesto kaj tre malgranda aŭtomobilo. La libro estas objekto, la kesto estas objekto, kaj ankaŭ la tre malgranda aŭtomobilo estas objekto.

Do, tri objektoj kuŝas sur la tablo. Per ili ludas la geknaboj. Ili estas iliaj ludiloj. Ankaŭ la pupoj de Lisa kaj Vera estas ludiloj. Aŭtomobilo estas veturilo, ĉar per ĝi oni veturas. Kaj per montrilo oni montras.

ludas - ludilo
veturas - veturilo
montras - montrilo

montriloj de la horloĝo

Sur la tablo kuŝas tri objektoj. La objekto, kiu estas bruna, estas la libro. La objekto, kiu estas ruĝa, estas la malgranda kesto. En ĝi kuŝas la pupo de Lisa. La objekto, kiu estas blua, estas la malgranda aŭtomobilo el plasto.

Ĝi estas unu el la ludiloj de Lisa. Karlo ne ludas per ĝi, ĉar Paŭlo havas pli grandan, kiu ne estas el plastiko, ankaŭ ne el metalo, sed el ligno. Ni scias, ke ligno estas la materialo el arboj. La benko, la seĝo kaj la tablo en la ĝardeno de ges-roj Hansen estas el ligno.

La objekto, kiu estas en lia mano, estas pilko. La pilko, kiun li havas en la mano, estas flava.

Vera manĝas. La frukto, kiun ŝi manĝas, estas pomo. Lisa desegnas. Ŝi desegnas virinojn. La virinoj, kiujn ŝi desegnas, ne estas modernaj kaj elegantaj, sed tre malelegantaj. Lisa ankoraŭ ne desegnas elegante.

Karlo diras al Vera:
— Mi havas kamaradon, kiu ĉiam havas bonan humoron. Lia nomo estas Optimisto. Li ĝojas. Mi desegnas lin. Rigardu lian vizaĝon! Ĉu vi vidas, ke li ĝojas? Lia tuta vizaĝo montras bonan humoron. La nomo de alia kamarado estas Pesimisto. Li ĉiam havas malbonan humoron. Mi desegnas ankaŭ lin. Rigardu lian vizaĝon! Li ne ĝojas, sed malĝojas. Li malĝojas, ĉar la patro ne havas aŭtomobilon. Li malĝojas, ĉar mi kaj multaj aliaj kamaradoj estas pli fortaj ol li. Li havas multajn problemojn, kiuj estas grandaj.

— Karlo, mi konas ilin, diras Vera. Optimisto estas simpatia persono, sed Pesimisto ne estas simpatia, sed malsimpatia. Mi ĝojas, ĉar vi estas kiel Optimisto, kiu ĉiam havas bonan humoron, kaj mi ĝojas ankaŭ, ĉar vi ĉiam estas ĝoja. Ankaŭ niaj gepatroj ĉiam estas ĝojaj.

la objekto, kiu...

la objektoj, kiuj...

pilko

La pilko, kiu estas flava
La pilko, kiun li havas
La pilkoj, kiujn li havas



optimisto: li ĝojas

pesimisto: li malĝojas

Li ĝojas =
li estas ĝoja

Pasas kvarona horo. Karlo denove legas, sed nun li ne plu legas romanon, sed matematikan libron. Li lernas matematikon. Ĝi estas tre interesa fako. Li lernas ankaŭ aliajn fakojn, ekzemple botanikon, geografion, desegnadon kaj gimnastikon.

Vera kaj Lisa parolas, ili interparolas, ĉar ambaŭ demandas kaj respondas. Ili ne ludas per la pupoj, sed ili ludas "Divenu!". Tio estas tre interesa ludo. Lisa tre ŝatas ĝin. Ŝi ŝatas ankaŭ aliajn ludojn. Se Vera diras la vortojn, Lisa divenas. Se Lisa diras la vortojn, Vera divenas. Aŭskultu!

— Mi scias objekton, kiu estas longa kaj bruna. La sinjoroj tre ŝatas ĝin. Ili ne manĝas ĝin, sed flaras ĝin per la nazo. Divenu!

Paŭzo, ĉar Lisa pensas. Post tio ŝi diras:

— Vera, mi scias. La objekto estas cigaro!

— Jes, tio estas vera. La objekto estas cigaro. Vi divenas bone. Nun vi diru la vortojn! Nun vi diru la vortojn de la enigmo! Ni divenas enigmojn. Lisa, vi tre bone divenas enigmojn. Diru nun enigmon!

— Mi scias objekton, kiu estas flava kaj ronda. Multaj geknaboj ludas per ĝi. Divenu!

Vera tuj divenas la enigmon, ĉar Lisa rigardas al la objekto. Sed ŝi ne diras la nomon de la objekto. Ŝi faras longan paŭzon, kaj post ĝi ŝi diras: Tio estas pilko.

— Jes, tuj diras Lisa. Vi divenas bone; vi divenas same bone kiel mi.

Tuj post tio diras Vera la novan enigmon:

— Mi scias beston, kiu estas granda. Ĝi havas nur du gambojn. Ili estas longaj kaj ruĝaj. Per ili ĝi iras en akvo. Sed ĝi ne trinkas la akvon. En la akvo vivas multaj malgrandaj bestoj, kiujn ĝi manĝas. Ankaŭ fiŝoj vivas en la akvo. En la vintro ĝi ne vivas en Eŭropo, sed en la varma Afriko. Ĝia buŝo estas longa. La nomo de longa buŝo estas beko. Ĝi estas ruĝa. Per la beko ĝi alportas tre malgrandajn infanojn al sinjorinoj. Divenu!

cirklo

Cirklo estas ronda. Ankaŭ la litero O estas ronda.

fiŝoj vivas en akvo

al/portas

Tuj Lisa diras:
— La nomo de la besto estas cikonio. Nia patrino diras, ke ĝi flugas al Egiptujo tuj post la somero, ĉar tie ekzistas multaj malgrandaj infanoj. llin la cikonio alportas al nia lando. Ĝi havas du flugilojn. Per la flugiloj ĝi flugas. Ili sidas sur la dorso. Ankaŭ ni havas dorson, sed sur ĝi ne sidas flugiloj.
— Lisa, ĉu vi scias la nomon de la bestoj, kiuj havas flugilojn?
— Jes, ili estas birdoj.
— Ĉu vi ankoraŭ scias la nomon de la buŝo de la birdoj?
— Jes, birdoj havas bekon.
— Ĉu birdoj havas harojn sur la kapo?
— Ne, ili ne havas harojn sur la kapo, sed ili havas plumojn. La plumoj estas ne nur sur la kapo, sed sur la tuta korpo.
— Ĉu vi havas plumojn sur via tuta korpo?
— Ne, mi ne havas plumojn sur mia tuta korpo. Sur la korpo la homoj ne havas plumojn, sed vestojn. La homoj portas vestojn. La sinjorinoj portas elegantajn vestojn. La vestoj de la knaboj kaj de la sinjoroj ne estas elegantaj.

Ankaŭ la patro estas en la ĝardeno. Li ne sidas inter la infanoj; li ankaŭ ne kuŝas kaj dormas sub la arboj. Li laboras. Li laboras per fosilo. Per la fosilo li fosas. Li fosas la teron. Li fosas longe kaj energie. Li estas tre varma. Li aŭdas la ludon de la knabinoj kaj tre ĝojas, ĉar Lisa lernas multe per la ludoj. Li faras paŭzon kaj iras al la infanoj. Li nun sidas inter ili kaj diras:

— Vi ludas "Divenu". Vi divenas enigmojn. Vi ambaŭ bone divenas. Ankaŭ mi havas enigmon. Divenu ĝin! La objekto estas bela kaj blanka; post tio ĝi estas verda kiel salato; kaj denove post tio ĝi estas ruĝa kiel tomato — kaj ĉiuj infanoj tre ŝatas ĝin. Ĉu vi scias?
Longa paŭzo. Neniu el la infanoj scias. Neniu el la infanoj parolas. Ĉiuj pensas energie, sed neniu divenas la enigmon de la patro.
— Ne, ni ne divenas vian enigmon. Diru mem! diras Karlo.


fosilo

neniu = ne unu

Ankoraŭ kelkaj sekundoj pasas, kaj la patro diras, ke la objekto estas ĉerizo.

— Ĉerizo estas frukto, kiun infanoj tre ŝatas. Ankaŭ la birdoj ŝatas ĉerizojn. Blanka kaj bela estas ĝia floro. La nova frukto estas verda kiel salato. Ĝi kreskas kaj fariĝas granda. La verda frukto fariĝas ruĝa frukto, kiun homoj kaj birdoj tre ŝatas. Ĉerizo ne estas frukto de arbusto, sed de arbo. Se la arbo ankoraŭ ne estas granda, ĝi kreskas kaj fariĝas granda. Ĉu vi ŝatas maturajn ĉerizojn?

— Jes! respondas ĉiuj tri.

— Ĉu ankaŭ vi ŝatas ilin? demandas Lisa al la patro.

— Jes, mi tre ŝatas ilin, sed nur se ili estas ruĝaj kaj maturaj, respondas la patro kaj demandas:

— Ĉu ankoraŭ unu enigmon?

— Jes! ili ĉiuj tri respondas.

— Estas du fratoj; unu estas pli granda ol la alia. Ili loĝas en la sama domo. Ili iras kaj iras konstante, ne nur en la tago, sed ankaŭ en la nokto. Inter la nokto kaj la tago estas la mateno, kaj inter la tago kaj la nokto estas la vespero. Ambaŭ fratoj iras kaj iras, en la tago, en la vespero, en la nokto kaj en la mateno, konstante, ĉiam. Ili ne kuŝas en la lito de la vespero ĝis la mateno, de la 20-a horo ĝis la 8-a horo. Ili iras konstante, sed la distanco ne kreskas. Ĉu vi scias?

La knabinoj ne divenas la enigmon. Sed Karlo tuj divenas ĝin, ĉar li jam konas ĝin; ĝi estas en unu el liaj legolibroj. Li tuj diras, ke la domo estas horloĝo, kaj ke ambaŭ fratoj estas du montriloj, unu pli granda ol la alia.

La patro demandas ankaŭ:

— Kiu homo havas du kapojn?

Vera tuj respondas:

— Neniu homo havas du kapojn!

— Kiu tomato estas el metalo?

— Neniu tomato estas el metalo!

— Ha, diras la patro, la aŭtomato estas el metalo.

— Ha, ha, ha! diras la infanoj kaj ridas. Ili ridas, ĉar la vortoj de la patro montras, ke li havas bonan humoron.

floroj de ĉerizujo

malmaturaj ĉerizoj



maturaj ĉerizoj

lego/libro

La patro demandas ankaŭ:
— Kiu homo havas du kapojn?
Vera tuj respondas:
— Neniu homo havas du kapojn!
— Kiu tomato estas el metalo?
— Neniu tomato estas el metalo!
— Ha, diras la patro, la aŭtomato estas el metalo.
— Ha, ha, ha! diras la infanoj kaj ridas. Ili ridas, ĉar la vortoj de la patro montras, ke li havas bonan humoron.



aŭtomato

LECIONO 10 (dek)

La sveda familio vizitas Kopenhagon.

La sveda familio Jansson venas al Kopenhago. La dana familio Hansen ne scias pri tio. Ges-roj Jansson kaj Petro kaj Pia vizitas diversajn butikojn kaj aĉetas diversajn objektojn. Post tio ili veturas per tramo al Zamenhof-strato 3 por viziti siajn parencojn.

En la tramo Pia demandas sian patrinon:

— Kien ni nun veturas?

La patrino respondas: Ni veturas al Zamenhof-strato 3 por viziti viajn gekuzojn kaj viajn geonklojn. Viaj geonkloj ŝatas vidi vin kaj Petron, kaj viaj gekuzoj ŝatas ludi kun vi. Ĉu vi ne ĝojas?

— Jes, respondas Pia, mi tre ĝojas, ĉar mi tre ŝatas miajn kuzinojn kaj mian kuzon. Mi ŝatas vidi ankaŭ ilian ĝardenon. En ĝi Petro kaj Karlo ludas indianojn.

— Ĉu vi ne ŝatas ludi indianojn?, demandas la patrino de Pia.

— Jes, mi tre ŝatas ludi indianojn, respondas Pia tuj. Mi scias, ke tio ne estas ludo por knabinoj, sed la ludoj de la knaboj estas pli interesaj ol la ludoj de la knabinoj.



tramo

Post sabato **venas** dimanĉo
Post januaro **venas** februaro
Banano **venas** el varmaj landoj

vizit**as**
por vizit**i**

Pia vizitas sian kuzon (=la kuzo de Pia)
Pia vizitas lian kuzon (+la kuzo de alia persono)

Ili vizitas sian kuzon
Ili vizitas ilian kuzon (=la kuzo de aliaj)

Multaj knabinoj ludas ĉiam nur per pupoj. Mi preferas la ludojn de la knaboj.

— Ĉu vi ne estas tro granda por ludi per pupoj? demandas ŝia patrino.

— Ne, mi ne estas tro granda, sed mi ne ŝatas tro ofte ludi per ili, kiel multaj aliaj knabinoj. La ludoj de la knaboj estas pli interesaj. Mi preferas ilin. Ekzistas ankaŭ knaboj, kiuj preferas ludi kun knabinoj.

Ili sidas longe en la tramo. Ĝi veturas jam pli ol duonan horon. Ofte ĝi haltas. Homoj venas kaj iras. Ankaŭ ĉe Zamenhof-strato la tramo haltas. La sveda familio iras el ĝi kaj iras al Zamenhof-strato 3, kie loĝas la familio Hansen.

Inter la strato kaj la domo estas malgranda ĝardeno. Tie kreskas nur floroj. Speciale belaj estas la rozoj. Ili havas multajn diversajn kolorojn: ruĝan, blankan, flavan kaj... nigran. Ne, tute nigra rozo ne ekzistas, sed preskaŭ nigra. Ankaŭ ne ekzistas tute nigraj homoj. Ili estas preskaŭ nigraj.

Oni tre ŝatas flari rozojn (oni ja flaras per la nazo), ĉar ili havas bonan odoron. Ilia odoro estas ilia parfumo. Preskaŭ ĉiuj homoj ŝatas la odoron de la rozoj. El ili oni faras parfumon. Speciale en varmaj landoj kiel Italujo, Francujo, Hispanujo kaj Bulgarujo oni faras rozo-parfumon, ĉar tie kreskas multaj rozoj kun speciale forta odoro.

Antaŭ la domo estas la floro-ĝardeno. Malantaŭ ĝi estas la frukto-ĝardeno, sed tion vi jam scias. Ni scias tion jam el la kvara leciono. En la frukto-ĝardeno kreskas ne nur arboj, sed ankaŭ arbustoj. Tie staras ankaŭ la benko, la tablo kaj la seĝo; Per aliaj vortoj: la mebloj de la ĝardeno. Tie ofte sidas la familio Hansen.

La domo Zamenhof-strato 3 estas la hejmo de la familio Hansen. Nun venas la kvar Malmoanoj por viziti ĝin. Sed S-ro Hansen, la kapo de la familio, ne estas hejme. Li estas en granda fabriko, kie li laboras. Li estas inĝeniero. En la fabriko laboras tricent personoj: 50 inĝenieroj kaj 250 laboristoj.

S-ino Hansen estas hejme. Ŝi tre ĝojas, ĉar ŝi ŝatas siajn svedajn parencojn, kaj ŝi ŝatas havi gastojn.

—Kio estas pli bona, kafo aŭ teo?
—Mi **preferas** kafon!

tie = en la ĝardeno



Ŝi flaras rozojn.
Ŝi ŝatas flari rozojn.

hejme = en la hejmo

— Bonan tagon — kaj bonvenon! ŝi diras al ili.
— Bonan tagon — kaj dankon! ili respondas. Ni ĝojas, ĉar vi estas hejme, kaj ĉar vi diras bonvenon.

Duona horo pasas. Ili ĉiuj sidas en la manĝoĉambro ĉirkaŭ la granda tablo kaj trinkas kafon kaj manĝas kukojn.

Ĉiuj geknaboj ŝatas kukojn kaj manĝas multajn. Vera ne tre ŝatas kafon. Ŝi preferas teon. Pia ne tre ŝatas kafon. Ankaŭ teon ŝi ne ŝatas trinki. Ŝi preferas limonadon. Lisa preferas lakton. Ĉiuj malgrandaj infanoj trinkas lakton.

S-ro Jansson ŝatas kafon. Li preferas fortan kafon kun sukero. Ankaŭ S-ino Jansson trinkas fortan kafon. Ŝi ĉiam trinkas kafon sen sukero, do ne kun sukero. Kafo kun sukero estas dolĉa. Ankaŭ ĉokolado estas dolĉa. Vera trinkas teon kun sukero. Ŝia patrino preferas kafon sen sukero, sed kun kremo. Kremo estas la plej bona parto de la lakto.

Kelkaj homoj ŝatas kafon kun kremo, aliaj ŝatas kafon sen kremo. En kelkaj landoj oni trinkas kafon kun varma lakto, en aliaj landoj oni trinkas kafon kun malvarma kremo. Kelkaj homoj preferas dolĉan kafon, aliaj homoj preferas kafon sen sukero. Multaj skandinavoj ne ŝatas la italan kafon Espresso, ĉar ĝi estas tro nigra kaj tro forta. Kaj multaj italoj ne ŝatas la skandinavan kafon, ĉar ĝi estas tro blanka kaj tro malforta.

Ges-roj Jansson kaj S-ino Hansen parolas multe kaj longe. Ankaŭ la geknaboj parolas multe kaj ridas multe. Ofte Lisa ne bone komprenas la svedajn gekuzojn kaj miskomprenas ilin — kaj ambaŭ familioj ridas. Ankaŭ Lisa.

Post longa tempo Karlo diras al sia patrino:
— Petro kaj mi preferas nun iri al la ĝardeno por ludi. Ĉu vi permesas?
— Jes, Karlo, mi permesas. Ankaŭ al ambaŭ grandaj knabinoj mi permesas iri al la ĝardeno por ludi.
— Dankon, onklino Eva, diras Petro kaj Pia.
— Dankon, panjo, diras Karlo kaj Vera.

bon/veno

manĝo/ĉambro

panjo = [kara] patrino
paĉjo = [kara] patro

Post unu minuto ĉiuj kvar estas en la ĝardeno malantaŭ la domo. La knabinoj iras al la benko sub la pomarbo. Tie ili sidas kaj parolas.

— Diru al mi, Vera, kial onklo Adam ne estas hejme? demandas Pia.

— Li laboras en la fabriko. Li iras al la fabriko en la mateno, kaj en la vespero li revenas. Nur en la vespero kaj en la nokto li estas hejme, kaj en la dimanĉoj.

Vera diras ankaŭ, ke ŝi ne ofte vidas la patron, ĉar nun li laboras multe, tro multe. Nur en la dimanĉoj li havas tempon por siaj gefiloj. Malofte li ludas kun ili. De tempo al tempo li iras kun ili al la parko proksime.

— Kion vi rigardas en la parko? demandas Pia.

— Ni rigardas interesajn arbojn kaj florojn. Ni ankaŭ lernas iliajn nomojn. Paĉjo scias la nomojn de preskaŭ ĉiuj arboj kaj floroj, kaj ankaŭ la nomojn de la multaj birdoj en la parko. Ĉar la parko estas proksime, ankaŭ Lisa iras kun ni. Ŝi ĉiam ĝojas, ĉar ŝi ŝatas la parkon kaj ĝiajn florojn kaj bestojn.

Pia havas en sia mano paperon, kaj en ĝi estas ĉokolado. Ŝi montras ĝin al Vera kaj diras:

— Ĉu vi ŝatas bonan svedan ĉokoladon?

Tuj Vera respondas:

— Jes, mi tre ŝatas ĝin. La sveda ĉokolado ĉiam estas dolĉa kaj bona.

Tuj ŝi donas ĝin al Vera kaj diras:

— La ĉokolado estas via.

— Dankon! Mi tre ĝojas, sed mi ne deziras ĝin nun, ĉar mi nun ne havas apetiton. Mi estas sata, tute sata! kaj ŝi montras per la mano al la kolo. Kolo estas la korpo-parto sub la kapo, inter la kapo kaj la brusto. Ĝirafoj havas tre longan kolon.

Vera ne havas apetiton. Ŝi estas sata. Ŝi ne deziras manĝi la ĉokoladon nun, sed post kelkaj horoj. Ŝi havas du grandajn ruĝajn pomojn kaj donas ilin al Pia. Pia diras:

— Dankon! Mi tre ŝatas pomojn, sed momente (=nun) mi ne deziras manĝi ilin, ĉar ankaŭ mi estas tute sata! Ankaŭ ŝi montras per la mano al la kolo.

re-venas

proksime =
en malgranda distanco

Ŝi donas la ĉokoladon al Vera.
Ŝi donas al Vera la ĉokoladon.

Se vi donas al mi ĉokoladon, mi ĝojas kaj diras al vi: "dankon".



— Sed mi deziras trinki. Ĉu ankaŭ vi deziras trinki?
—Jes, ankaŭ mi deziras trinki. Kion vi deziras? Ĉu limonadon, akvon aŭ lakton?
— Mi preferas limonadon, se vi permesas! diras Pia.

Ankaŭ Vera preferas limonadon, kaj ŝi tuj iras al la domo, kie ŝia patrino donas al ŝi du glasojn kaj du botelojn. Ŝi tuj revenas. Denove ili sidas sur la benko sub la pom-arbo. Ili ĝojas, trinkas multe — kaj parolas multe.

Ankaŭ Petro kaj Karlo ĝojas. Ili sidas en diversaj arboj kaj ludas "indianojn". Ili ne flugas de unu arbo al la alia, sed ili saltas. Ili ja ne havas flugilojn kiel la birdoj, sed saltas kiel katoj de unu branĉo al la alia, kaj de unu arbo al la alia.

Ili venas ankaŭ al la pom-arbo, sub kiu sidas ambaŭ knabinoj sur la benko. Vera kaj Pia trinkas, ĝojas kaj parolas — kaj ili ne aŭdas, ke la knaboj sidas super ili. Ili ankaŭ ne vidas ilin, ĉar ĉirkaŭ la knaboj kaj super ili estas multaj branĉoj kun multaj folioj. La knaboj parolas ne per la buŝo, sed per la okuloj kaj per la manoj.

Unu, du, tri! Ambaŭ knaboj saltas el la arbo kaj staras antaŭ la knabinoj. En la mano ĉiu knabo havas ŝnuron. Per ĝi ili ligas la knabinojn al la pomarbo. La knabinoj ĝojas, ke la knaboj ludas kun ili, kaj ke ankaŭ ili nun ludas "indianojn".
— Kial vi ligas nin al la arbo? Ni estas bonaj kamaradoj de la indianoj. Vi estas du malbonaj homoj. Ni protestas! diras Vera.

Petro respondas per vortoj kaj per ŝnuro. Li batas la knabinojn per la ŝnuro kaj diras, ke ili estas malbonaj blankaj virinoj.

En la ĝardeno inter la arboj iras S-ino Hansen kaj S-ino Jansson. Ili aŭdas la "belajn" vortojn de la knaboj. Ili komprenas la situacion... kaj la knaboj malligas la knabinojn.

glaso kaj botelo

li saltas

La buŝo estas **sub** la nazo.
La nazo estas **super** la buŝo.


ŝnuro

Ili ligas ŝin per la ŝnuro

mal/ligas